# BULTENO
## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

N-ro 44 (oka jaro) Oktobro 1931


Aperas ĉiudumonate kiel aldono al « ESPERANTO » Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENÈVE

ENHAVO : Morto de S-ro Arthur Fontaine. — La nova Prezidanto de la Administra Konsilantaro. — La Administra Konsilantaro. — Meksiko Fariĝas Membro de la Internacia Labororganizaĵo. — Novaj ratifoj. — Misio de la I. L. O. iros Egiptujon. — Listo de la rekomendoj. — Paĝo pri kooperado.

# Morto de S-ro Arthur FONTAINE

***Prezidanto de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo***

1860 — 1931



**Arthur FONTAINE**

## Arthur FONTAINE †

La 2a de septembro 1931 mortis en Parizo, post trimonata malsano, la Prezidanto de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo, Sro. Arthur Fontaine, reprezentanto de la franca registaro. La morto de sia prezidanto estas tre grava perdo por la Internacia Labora Organizo.

Arthur Fontaine naskiĝis en Parizo la 3-an de novembro 1860. Li eniris la Parizan Politeknikan lernejon en 1880, kaj poste la Lernejo de la Minejoj, el kiu lasta-li eliris en 1886 kiel mineja inĝeniero. Post kvin jara laboro en minejoj de Arras, la juna inĝeniero estis vokita al Parizo por kunlabori al la organizo de la nova franca Ŝtata Labora Oficejo, kiu iĝis en 1906 la nuna Ministerio de Laboro.

Unue sekcio-ĉefo en la franca Laboroficejo, li iĝis poste adjunkto-direktoro kaj fine direktoro de tiu-ĉi oficejo. Estis li kiu preparis la unuan profesian recenson en Francujo dum la jaro 1896; estis li kiu kreis la Bultenon de la franca Labora Oficejo; estis li ankaŭ kiu organizis la statistikojn de la laborakcidentoj, de la sociaj asekuroj, de la konsumaj kooperativoj. Oni povas juste diri ke li preparis ĉiujn sociajn leĝojn voĉdonitajn en Francujo dum la lastaj kvardek jaroj, kiel la leĝo de 1898 pri la laborakcidentoj, la leĝo pri semajna ripozo, la leĝo pri la okhora labortago, k.t.pl.

En 1900, li partoprenis ĉe la fondiĝo de la grava « Internacia Asocio por Leĝa Protektado de la Laboristoj »; en 1904, li traktis la konkludon de la franca-itala laborkontrakto, kiu estis la unua laborkontrakto inter du nacioj; en 1906, li traktis kaj firmis por Francujo la konkludon de la Bernaj konvencioj pri nokta laboro de la virinoj kaj malpermeso de uzo de blanka fosforo por la fabrikado de alumetoj; tiuj-ĉi konvencioj estis la unuaj agoj de internacia laborleĝfarado.

En 1913, li preparis novajn konvenciojn por la protekto de la infanoj.

La milito provizore rompis tiujn unuajn internaciajn ligilojn. Sed dum la periodo de la Packonkludo, fortega ideo trudiĝis sin en ĉiuj koroj : daŭra paco, forta paco, paco inda de Ligo de Nacioj, tia paco « povas esti starigata nur sur la bazo de socia justeco ». Al tiu penso, la unuaj eksperimentoj kaj la metodoj elprobitaj de Arthur Fontaine permesis tuj doni la necesan kadron. Oni kreis la Internacian Laburorganizaĵon, forigante la kutimajn hezitojn, kaj ĉe ĝia starigo en 1919, Arthur Fontaine fariĝis, kaj ĉiam estis reelektita, Prezidanto de la Administra Konsilantaro. La Internacia Labora Organizaĵo estis grandparte lia verko, kaj lian gravegan rolon en ĝia agado bonege vidigas la unuanimeco kun kiu la reprezentantoj de la registaroj, de la mastroj kaj de la laboristoj ĉiam reelektis lin al la prezidenta seĝo.

## La nova Prezidanto de la Administra Konsilantaro

En sia lasta kunsido (oktobro 1931) la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo elektis unuanime S-ron Ernest Mahaim (Belgujo) kiel sia nova Prezidanto.

S-ro Mahaim, kiu naskiĝis la 27-an de aprilo 1865, estas la plejaĝa membro de la Konsilantaro. Jam de multaj jaroj li okupiĝas pri internacia laborleĝfarado; estis laŭ lia propono ke la Kongreso por Laborleĝfarado starigis, en Parizo (dum la jaro 1900) Internacian Asocion por leĝa protektado de la laboristoj, kies ĉiam tre aktiva membro li restis ĝis la jaro 1914.

Li publikis plurajn verkojn, inter kiuj « Traktado de internacia laborista leĝoscienco » laŭ lekcioj faritaj ĉe la Pariza Fakultato de Juro en 1912, kaj alia pri « La Internacia Labora Organizaĵo » el kurso ĉe la Akademio por internacia Juro en Hago (1924).

Kiel teknika delegito de Belgujo ĉe la Pariza Packonferenco, S-ro Mahaim partoprenis en 1919 la laborojn de la Komisiono pri internacia Laborlêgfarado, kiu redaktis la Parton XIII-an de la Packontrakto de Versailles.

En 1921, li fariĝis belga ministro de la Industrio, Laboro kaj Provizumado. De post 1923, li direktas la Sociologian Instituton starigitan de S-ro Ernest Solvay en Bruxelles.

S-ro Mahaim estas membro de la Reĝa Belga Akademio, de la Internacia Statistika Instituto, de la Instituto de internacia Juro kaj de la *Institut de France*. Li reprezentas la belgan registaron ĉe la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo kaj ĉe la Internaciaj Laboraj Konferencoj de post ilia starigo; en 1930, li prezidis la dekkvaran kunsidon de la Internacia Laborkonferenco.

## Meksiko fariĝas membro de la Internacia Laburorganizaĵo

La Meksika Respubliko fariĝis membro de la Ligo de Nacioj dum la kunveno de septembro 1931. Sekve, ĝi ankaŭ fariĝis membro de la Internacia Laburorganizaĵo.

La Delegitoj de Meksiko al la kunveno de la Ligo de Nacioj, S.roj Portès Gil, antaŭa Prezidanto de la Respubliko, kaj Martinez de Alva, vizitis la Internacian Laboroficejon la 1-an de oktobro 1931. Ili estis ricevitaj de S-ro H. B. Butler, Adjunkto-Direktoro de la Oficejo, kiu nome de la forestinta Direktoro, S-ro Albert Thomas, prezentis al ili plej korajn salutojn de bonveno en la Organizaĵo.

Kun la eniro de Meksiko, la nombro de la Ŝtatmembroj fariĝas 56, kaj tiu de la Ŝtatoj ne-membroj 8.[1]

[1] La 56 Ŝtatmembroj estas : Albanujo, Argentina Respubliko, Aŭstralujo, Austrujo, Belgujo, Bolivio, Brazilujo, Brita Imperio, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Ĉilo, Ĉinlando, Danlando, Dominikana Respubliko, Estonujo, Etiopujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Greklando, Guatemalo, Haitio, Hispanujo, Honduraso, Hindujo, Hungarujo, Irlanda Libera Ŝtato, Italujo, Japanlando, Jugoslavio, Kanado, Kolumbio, Kubo, Latvolando, Liberio, Litovujo, Luksemburgo, Meksiko, Nederlando, Nikaraguo, Norvegujo, Nov-Zelando, Panamo, Paraguajo, Peruo, Persujo, Pollando, Portugalujo, Rumanujo, Salvadoro, Siamo, Sudafriko, Svedujo, Svislando, Urugvajo, Venezuelo. La 8 nemembroj estas : Afganistano, Kosta-Riko, Egiptujo, Ekvadoro, Hedjazo, Turkujo, U.R.S.S., Usono.

## Novaj Ratifoj de la Internaciaj Laborkonvencioj

La Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj registris la 7-an de septembro 1931 la nepran ratifon, per la registaro de *Hindujo,* de la konvencio pri sciigo de la pezo de multpezaj pakaĵoj transportataj surŝipe (alprenita dum la dekdua kunsido de la Internacia Labora Konferenco, en 1929).

Plie, la nepra ratifo, per la registaro de *Hispanujo,* de la konvencio pri kompenso pro labor-akcidentoj en agrikulturo (alprenita dum la tria kunsido, en 1921) estis registrata ĉe la Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj la 1-an de oktobro 1931.

Fine, la *Ĉila Respubliko* registrigis la 8-an de oktobro 1931 la ratifon de kvin konvencioj, nome : la konvencio pri nokta laboro de virinoj en la industrio (unua kunsido 1919), la konvencioj pri kompenso pro la laborakcidentoj kaj pri egaleco de traktado de fremdaj kaj naciaj laboristoj pri kompenso pro laborakcidentoj (sepa kunsido 1925), la konvencioj pri malsano-asekuro de la laboristoj en industrio kaj komerco kaj domservistoj, kaj pri asekuro kontraŭ malsano de la agrikulturaj laboristoj (deka kunsido, 1927).

Tiuj 7 ratifoj portas la nombron de la ratifoj ĝis nun registrataj al 447 por la 31 konvencioj alprenitaj de la Internacia Laborkonferenco, kies liston oni trovos en nº 45-a de la « Bulteno ».

## Misio de la I. L. O. iros Egiptujon

La egipta registaro demandis al la Internacia Laboroficejo sendi al Egiptujo konsilan mision kiu studu surloke la nunajn kondiĉojn de la enlanda industrio kaj kiu prezentu al la egipta registaro raporton pri la plej taŭga maniero organizi nacian Laboroficejon.

En sia oktobro Kunsido, la Administra Konsilantaro de la I.L.O. rajtigis la Direktoron de la Oficejo sendi tian mision en Egiptujo.

## La Rekomendoj alprenitaj de la ĝisnunaj Laborkonferencoj

Kiel oni scias, la decidoj alprenitaj de la Konferenco koncerne demandoj enskribitaj en sia tagordo prenas la formon aŭ de *projektoj de konvencioj* aŭ de *rekomendoj.* Ili estas devige submetataj de la registaro de ĉiu Membro-Ŝtato, en tempolimo de unu jaro (18 monatoj en esceptaj kazoj) al la kompetenta aŭtoritato (tio estas, ĝenerale, la nacia parlamento) por leĝdono aŭ alia ago.

La *projektoj de konvencioj* fariĝas *konvencioj* inter la Ŝtatoj kiuj ratifis ilin.

Por la *rekomendoj,* ne okazas ratifo, sed la aranĝoj faritaj por ilia realigo devas esti komunikataj al la Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj.

Jen la listo de la rekomendoj ĝis nun alprenitaj de la Internaciaj Laborkonferencoj :

| *Jaro :* | *Nº :* | *Enhavo :* |
|---|---|---|
| 1919. | 1. | Senlaboreco. |
| | 2. | Reciprokeco je traktado de eksterlandaj laboristoj. |
| | 3. | Antaŭrimedoj kontraŭ karbunkolo. |
| | 4. | Protekto de virinoj kaj infanoj kontraŭ plumba venenado. |
| | 5. | Kreo de publika higiena organizo. |
| | 6. | Apliko de la Berna Konvencio pri malpermeso de blanka fosforo. |
| 1920. | 7. | Limigo de laborhoroj en la fiŝkapta industrio. |
| | 8. | Limigo de laborhoroj en enlanda ŝipirado. |
| | 9. | Starigo de naciaj maristaj kodoj. |
| | 10. | Asekuro de maristoj kontraŭ senlaboreco. |
| 1921. | 11. | Antaŭforigo de senlaboreco en agrikulturo. |
| | 12. | Protekto de virinoj salajrataj en agrikulturo antaŭ kaj post akuŝo. |
| | 13. | Nokta laboro de virinoj en agrikulturo. |
| | 14. | Nokta laboro de infanoj kaj gejunuloj en agrikulturo. |
| | 15. | Disvolviĝo de teknika instruado en agrikulturo. |
| | 16. | Loĝejoj kaj dormejoj de agrikulturaj laboristoj. |
| | 17. | Sociaj asekuroj en agrikulturo. |
| | 18. | Semajna tagripozo en komercaj entreprenoj. |
| 1922. | 19. | Statistikoj pri elmigrado. |
| 1923. | 20. | Laborinspektado. |
| 1924. | 21. | Utiligo de la libertempo de laboristoj. |
| 1925. | 22. | Egaleco de traktado por naciaj kaj eksterlandaj laboristoj pri kompenspago por akcidentoj. |
| 1925. | 23. | Kompenspago por laborakcidentoj (minimumsumo). |
| | 24. | Kompenspago por laborakcidentoj (solvo de konfliktoj). |
| | 25. | Kompenspago por profesiaj malsanoj. |
| 1926. | 26. | Protekto de virinoj kaj junulinoj elmigrantaj surŝipe. |
| | 27. | Reenpatrujigo de la kapitanoj kaj lernantoj maristaj. |
| | 28. | Inspektado de la maristoj. |
| 1927. | 29. | Ĝeneralaj principoj de asekuro kontraŭ malsano. |
| 1928. | 30. | Aplikado de metodoj pri fiksado de minimumaj salajroj. |
| 1929. | 31. | Antaŭforigo de laborakcidentoj. |
| | 32. | Sendanĝerigiloj ĉe maŝinoj movitaj per mekanika forto. |
| | 33. | Konsultado de profesiaj organizaĵoj por starigo de reguloj pri sendanĝero de la laboristoj ŝarĝantaj kaj deŝarĝantaj ŝipojn. |
| 1930. | 34. | Nerekta devigo. |
| | 35. | Reguligo de la deviga aŭ perforta laboro. |
| | 36. | Laborhoroj en la hoteloj, restauracioj kaj similaj entreprenoj, k. t. pl. |
| | 37. | Laborhoroj en teatroj kaj aliaj distraĵejoj. |
| | 38. | Laborhoroj en hospitaloj, k. t. pl. |

## La Administra Konsilantaro

La Internacia Laboroficejo staras sub la gvidado de Administra Konsilantaro, konsistanta el 24 personoj, el kiuj 12 estas reprezentantoj de la registaroj, 6 reprezentantoj de la mastroj kaj 6 reprezentantoj de la laboristoj.

De post la lasta Internacia Labora Konferenco, la estraro de la Administra Konsilantaro konsistas el la sekvantaj personoj :

*Prezidanto :*

S-ro Ernest Mahaim (Belgo, registara reprezentanto).

*Vic-Prezidantoj :*

Sir Atul Chatterjee (Hindo, registara reprezentanto).
S-ro Oersted (Dano, mastra reprezentanto).
S-ro Mertens (Belgo, laborista reprezentanto).

# PAĜO PRI KOOPERADO

## La unua internacia kooperativa grand-fabrikejo

Antaŭ kelkaj monatoj komencis labori apud Stockholm en Svedlando, la unua internacia kooperativa fabrikejo konstruata kun la celo kontraŭbatali internacian privatan kartelon. Traktas pri la sveda fabrikejo de elektraj lampoj « Luma » starigata de la Sveda Kooperativa Unuiĝo, al kiu ni cetere jam mallonge aludis en nia lasta numero. Tiu fabrikejo nun fariĝis internacia.

La nova fabrikejo kovras terspacon da 43.000 kvadratmetroj, kaj jam proviĝis tre sukcesa. Ĝia starigo estas granda paŝo antaŭen al kooperativa liberigo de la aĉetantoj de komercaĵoj kies prezoj estas sen neceso altigataj per monopola agado. Oni ŝuldas tiun sukceson antaŭ ĉio al la Sveda Kooperativa Unuiĝo, kiu jam starigis antaŭe proprajn margarino-, faruno- kaj galoŝofabrikejojn por kontraŭbatali la ekspluaton de la publiko per diversaj karteloj aŭ aliaj monopolaj industriaj organizaĵoj.

La starigo de fabrikejo de elektraj lampoj estis nekaŝe preparita kiel batalilo kontraŭ povoplena internacia kartelo, la « Phoebus »-kartelo, al kiu partoprenas kvazaŭ ĉiuj fabrikoj de elektraj lampoj en la mondo. Dank'al tia monopola situacio, la kartelo povis altrudi altajn prezojn por siaj lampoj.

La Sveda Kooperativa Unuiĝo unue instigis, dum pluraj jaroj, detalajn studojn de la tuta afero. En februaro 1929, ĝi publikigis libron de S-ro A. Hedberg (kiu fariĝis poste unu el la du direktoroj de la nova fabrikejo) pri la mondmonopolo de elektraj lampoj. Postaj studoj montris ke kun la nura sveda merkato, kiu bezonas jare 8 ĝis 10 milionojn da lampoj, estus ebla komence starigi fabrikejon kun jara produktebleco de 2 milionoj da lampoj, vendeblaj po 0,85 kr. (anstataŭ 1,35 Kr., prezo je kiu vendis ilin la kartelo). Oni do decidis konstrui, laŭ planoj faritaj en la konstruoficejo de la Sveda Kooperativa Unuiĝo, la novan kooperativan fabrikejon. Dum la tuta konstruado, la kooperativaj ĵurnaloj informis la publikon pri la progresoj de la afero. Fine, la 15-an de februaro 1931, oni povis komenci la vendon de la nova produkto, al la prezo antaŭkalkulita (0,85 kr.). La vendo tre rapide progresis, kaj oni devis pliigi la antaŭviditan produktadon (8.000 lampoj potage), tiel ke la fabrikejo estas jam pligrandigota.

Dank'al tiuj klopodoj, la monopolo de la privata kartelo falis; ĝis devis intersekve malaltigi siajn prezojn, ĝis ili atingis, la 3-an de septembro tiujara, la prezniveloin de la « Luma » lampoj. La tuta malaltigo atingis do 0,50 kr. po lampo, t.e. 37 %. Se oni konsideras nur la svedan konsumadon, tia malaltigo reprezentas ŝparon je 5 milionoj da kronoj por la Sveda loĝantaro, sumo kiu preskaŭ egalas la tutajn konstrukostojn de la fabrikejo.

La kooperativa lampfabrikejo, unue sveda, fariĝis internacia la 28-an de majo 1931. Ĝi apartenas de tiam al nova societo, la « Kooperativa Lumaförbundet Limited » (mallonge nomata « Luma »). Tiu-ĉi societo nuntempe kunigas kvin centrajn kooperativajn organizaĵojn, nome : 1) la Sveda Kooperativa Unuiĝo ; 2) la Dana Konsuma Kooperativa Unuiĝo ; 3) la Norvega Konsuma Kooperativa Unuiĝo ; 4) la Finnlanda Pogranda Societo, kaj 5) la Pogranda Societo de la Finlanda Centra Unuiĝo de Konsumaj Kooperativaj Societoj. La centraj kooperativaj organizaĵoj de la aliaj landoj povas ĉiam ankoraŭ aliĝi. La Direktanta Konsilantaro de la « Luma »-Societo konsistas nun el S-roj : A. Johansson (Prezidanto), L. Broberg, A. Juell, H. Vasenius kaj J. Alanen.

La starigo de tiu internacia kooperativa fabrikejo, celanta kontraubatali internacian privatan kartelon, estis iome plisimpligata pro la fakto ke la kooperativa movado jam atingis tre grandan elvolviĝadon en la kvar diritaj landoj (Svedujo, Norvegujo, Danujo kaj Finnlando), kaj ankaŭ pro la fakto ke la organizaĵoj kiuj starigis la Societon « Luma » estis jam kunigitaj en kuna aĉeta unuiĝo, la « Nordisk Andelsförbund ». Fakte oni decidis la starigon de la « Luma » Societo dum ĝenerala kunsido de tiu lasta unuiĝo.

Kiel diris la aŭtoro de la antaŭcitita studo pri la internacia monopolo de la elektraj lampoj, « Malgraŭ la fakto ke la tempo ne ankoraŭ venis por starigo de internaciaj kooperativaj entreprenoj kiuj direktas industriajn fabrikejojn, povas tamen ekzisti cirkonstancoj kiuj povas naskigi tiajn entreprenojn. Se la internaciaj karteloj daŭrigas sian evoluon kun la sama rapideco kiel ĝis nun — kaj ĉio montras ke tio verŝajne okazos — la kooperativa movado eble konstatos ke sia estonto dependas nur de sia internacia agado, eĉ en industriaj aferoj ».

La sukceso de la « Luma » Societo montras nun ke tiu vojo estas irebla. Ĝi certe malfermas grandegajn eblecojn al la internacia kooperativa movado.

## Internacia Instituto por Kooperativaj Studoj

Internacia Instituto por Kooperativaj Studoj estis kreata en Basel (Svislando) la 5-an kaj 6-an de oktobro 1931, laŭ la iniciativo de Profesoro Charles Gide, de la *Collège de France* en Parizo.

Laŭ artikolo unua de siaj statutoj, la Instituto « emas kunigi intelektulojn interesiĝantaj pri la kooperativa movado, kaj studi libere kaj science ĝiajn ĉefajn problemojn ; ĝi organizos kunvenojn kaj faciligos la rilatojn inter la membroj ».

La Instituto neniel miksiĝos en la laboro de la reprezentaj organizaĵoj de la kooperativa movado ; ĝia agado estos nure scienca.

Ĉiuj membroj de la Instituto estos elektataj nur persone, kaj ne kiel reprezentantoj de ia grupo aŭ de la aŭtoritatoj de ia nacio.

Dekunu autoroj kaj profesoroj venis speciale al Basel por la inaŭguracio de la Instituto. Estis tiuj la S-roj : Barou (London), Borodajewski (Praha), Faucherre (Basel), Gide (Paris), Grünfeld (Halle), Ihrig (Budapest), Lavergne (Paris), Mladenatz (Bukureŝti), Poisson (Paris), Tomagnini (Oporto) kaj Totomianz (Praha).

La ĉeestantaj membroj redaktis la statutojn de la Instituto kaj alprenis rezolucion favoran al ĉiujara kunsido de la Instituto. La proksima kunsido okazos en Parizo dum oktobro 1932.

Profesoro Charles Gide estis elektita Prezidanto per unuanima aplaŭdo de la ĉeestantoj. Kiel ĝeneralaj sekretarioj oni elektis S-rojn M. Grünfeld, Profesoro ĉe Universitato de Halle (Germanujo) kaj B. Lavergne, Profesoro ĉe Universitato de Lille (Francujo).

La studoj faritaj sub la aŭspicoj de la Instituto aperos en la kooperativaj revuoj « Vierteljahrschrift für Genossenschaftswesen » kaj « Revue des Etudes coopératives », kies direktoroj estas la Profesoroj Grünfeld kaj Lavergne, membroj de la nova Instituto.

L'IMPRIMEUR-GÉRANT : A. GRANCHAMP, 2, RUE DES USINES, ANNEMASSE - 871-12-31